Christian Morgenstern,

Al la nuboj

tradukita de Manfredo Ratislavo

Kaj ĉiam denove,
kiam mi rigarde laciĝis
je la homaj vizaĝoj,
je tiom da speguloj
de senlima stulteco,
mi levis miajn okulojn
super la domojn kaj arbojn
supren al vi,
vi eternaj pensoj de ĉielo,
kaj viaj grando kaj libero
liberigis min ree ĉiam,
kaj mi pensis kun vi
trans landoj kaj maroj
kaj mi pendis kun vi
super la abismo de l' senlimo
kaj mi disiĝis fine
kiel vaporaĵo,
kiam mi la senmezuran
semon de l' steloj
vidis flugi
super la agroj
de l' neekkoneblaj profundaĵoj.

Traduko de la Germana poemo "An die Wolken" de Christian Morgenstern *(Kristiano Matenstelo, ∗1871-05-06 – †1914-03-31) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04).*

Arg-78-153 (2003-11-03 10:03:43)